

Aleksandr Puŝkin

Eŭgeno Onegin(Fragmentoj)

Содержание

Valentin Melnikov rakontas	0004
1	0013
2	0016
4	0018
5	0021
6	0023
7	0025
7	0026
9	0028
10	0031
LETERO DE TATJANA AL ONEGIN	0032
LETERO DE ONEGIN AL TATJANA	0036

Aleksandr Puŝkin
Eŭgeno Onegin
Fragmentoj
Tradukis Valentin Melnikov
La Ondo de Esperanto. 2003.
№ 6 (104)

Valentin Melnikov rakontas

Ĉi tiu dokumento uzas la unikodan signaron UTF-8. Enciklopedio de la rusa vivoValentin Melnikov rakontas Malfacilas klarigi al alinacia leganto, kion signifas Aleksandr Sergejeviĉ Puŝkin (1799–1837) por ĉiuj rusoj. Verŝajne ne eblas diri pli bone, ol diris A.Grigorjev, rusa poeto de la 19a jc.: “Puŝkin estas nia ĉio”. Dum la festado de lia 200-jara jubileo tiu frazo estis ofte ripetata...

Puŝkin fakte kreis la modernan rusan lingvon, formis bazon kaj principojn de la rusa poezio. Se oni vidas ruslingvan poemon sen indiko de aŭtoro kaj dato — oni tuj povas diri senerare, ĉu ĝi estis verkita antaŭ aŭ post Puŝkina tempo.

Apenaŭ kredeblas, ke dum tiom nelonga vivo li sukcesis krei tiom multajn verkojn en plej diversaj ĝenroj: lirikaj miniaturoj, grandaj historiaj poemoj, “malgrandaj tragedioj”, fabeloj, prozo... Ĉio estas vere genia, ĉion oni konstante reeldonas kaj plezure legas sendepende de ajnaj historiaj ŝanĝoj en Ruslando.

Versa romano *Eŭgeno Onegin* estas probable la plej elstara verko de tuta rusa literaturo. Fama

kritikisto V.Belinskij prave nomis ĝin “enciklopedio de la rusa vivo”: vere, la rusa vivo — kaj nobela en la ĉefurboj, kaj kampula en vilaĝo (Puŝkin priskribis bone konatan medion en Pskova provinco, kie situis lia propra bieno), kun ĉiuj moroj, tradicioj kaj aktualaj eventoj — estas montrita plej fidele kaj detale. La aŭtoro certigis la legantojn, ke la tempo en la romano estas kalkulita laŭ kalendaro; la priskribataj eventoj komenciĝas fine de 1819. Apud la elpensitaj protagonistoj rolas realaj konataj homoj kaj la aŭtoro mem. Krome, li kelkloke citas aŭ parodias la poetojn-samtempulojn, kaj eĉ sukcesas kun ili polemiki, ofte apelacias al la leganto — do la “spirito de l' tempo” senteblas perfekte.

Aliflanke, la romano influis la vivon: preskaŭ forgesita nomo Tatjana subite iĝis tre populara kaj restas tia ĝis nun; kelkaj iam furoraj libroj kaj kantoj, primokitaj pro sengusta banaleco, rapide elmodiĝis. Speciale por tiu romano Puŝkin kreis novan formon, la 14-linian strofon, kiu ekde tiam nomiĝas “strofo de Onegin” — kelkfoje poste ĝin uzis ankaŭ aliaj aŭtoroj. Formale obeante tradiciojn de klasikismo (ekzemple, per plurfoja

menciado de mitologiaj herooj), la romano estas tute novstila, kaj eĉ seriozaj filozofiaj rezonoj en ĝi sonas leĝere kaj ne enuigas. (Vere, iujn progresemajn ideojn ne eblis rekte esprimi pro cenzuraj kaŭzoj — tial Puŝkin ofte nur aludas ilin, priskribante ĉiutagaĵojn.) Unuafoje poezio (ne satira) traktis ankaŭ la “krudan naturon”, sed ne nur ion altspiritan, laŭ klasikismaj dogmoj. Specifa lirike-ironia tono signas tute apartan kreaĵon de Puŝkin. Diference de la plifruaj aŭtoroj li montras la karakteron de sia heroo ne finformiĝinta (klare pozitiva aŭ klare negativa), sed evoluanta, manifestiĝanta per diversaj flankoj en diversaj situacioj. Forestas rekta moralo, arbitra aŭtoro influo — la herooj kondutas konforme al siaj karakteroj kaj cirkonstancoj, iam eĉ kvazaŭ spite la aŭtoran volon. Unuafoje romano ne havas tradician finon (la herooj geedziĝas, la bono triumfas, la malbono estas punita ktp.) — tio influis al ĉiuj postaj rusaj romanoj. Puŝkin mem emfazas orientiĝon de sia verko al neprognozebla reala vivo kun ties tuta komplikeco kaj diverseco.

Temas pri ŝajne simpla, preskaŭ banala historio — ekzistas eĉ klasika opero laŭ tiu

romano. Riĉa junulo Eŭgeno Onegin veturas el la ĉefurbo en vilaĝon por ekmaŝtri bienon de sia forpasinta onklo kaj restas tie, ĉar urba aristokrata vivo tedis lin. Li trovas tie unusolan amikon — Lenskij; kaj Tatjana, fraŭlino el najbara bieno, baldaŭ enamiĝas al li, naive kaj sincere, ĉar li tute ne similas la ceterajn najbarojn. Li rifuzas ŝian amon kaj edife riproĉas ŝin. Pro bagatela kaŭzo troemocia Lenskij subite vokas la amikon al duelo, do Onegin hazarde kaj kontraŭvole murdas lin. Konsternita, Onegin forveturas kaj dum tri jaroj vojaĝas, strebante trovi animan ekvilibron kaj ian sencon por sia vivo. Fine li revenas en la ĉefurbon kaj denove renkontiĝas kun Tatjana, kiu jam estas edzino de lia konato. Nun subite jam Eŭgenon kaptas amo al ŝi, kaj ŝi malvarme rifuzas sen ia ŝanco...

Kritikistoj kaj aŭtoroj de mezlernejaj instrulibroj ofte emfazas, ke Onegin estas “superflua homo”, ne povanta trovi sian lokon en la vivo. Tamen lia spleno ne estas nur afekta moda sento. Ja li vere forlasas la mondumon, kiu lacigis lin per sia surloka kuro, okupiteco sen afero. Sed Onegin ne scipovis kaj ne volis ion fari: tiel edukis lin la francaj gubernistoj. Tiam

Ruslando donis malmultajn eblojn por saĝa kaj spirite riĉa homo, ne deziranta vivi tute same kiel ĉiuj. Nur la subita enamiĝo redonis al li sentivon, plenigis per senco lian vakan kaj vantan vivon. La lastaj vortoj de Tatjana, forprenintaj la esperon, skuis lin. La lasta rendezuo okazis marte aŭ aprile 1825 — kelkajn monatojn antaŭ la fama decembra ribelo...

La romano estis verkita en 1823–1830 kaj devis konsisti el 9 ĉapitroj. Tamen la 8a ĉapitro, priskribanta la vojaĝon de Onegin tra Ruslando, speciale tra lokoj de gloraj historiaj eventoj, enhavis komparon de heroa paseo kun la mizera nuno, tre akrajn konkludojn — do certe ne povus trapasi cenzuron. Tial Puŝkin preferis forigi la tutan ĉapitron (kiu sen la preterlasitaj strofoj iĝis tro kurta kaj pala), transmetinte kelkajn strofojn al la sekva. Laŭ nova statuto de 1828 la cenzuro, ŝajne, iom mildiĝis; Puŝkin esperis ke nova caro Nikolao I amnestios la decembristojn kaj efektivigos progresemajn reformojn. Tiam eblus priskribi la antaŭnelongan historion kaj negativajn trajtojn de la plifrua reĝimo — Puŝkin komencis verki la dekan ĉapitron, kun kroniko de la eŭropaj militoj kaj decembrista movado.

Onegin, liberpensema kaj malŝatanta aristokratan socion, devus iĝi decembristo aŭ pereji en Kaŭkaza milito. Tamen la esperoj iĝis vanaj, Puŝkin devis redukti la planon kaj presigi nur ok ĉapitrojn.

Laŭ esprimo de jam menciita kritikisto Belinskij, la romano restis sen la fino — ĉar en realo ekzistas eventoj sen kulmino, sen celo; homoj kompreneblaj por neniu, eĉ ne por si mem...

Multaj literaturologiaj verkoj diversflanke traktas kaj esploras tiun romanon — neniu alia rusa libro estas tiom profunde neelĉerpebla. Vi certe ne povos kompreni la “enigman rusan animon” sen atente legi *Eŭgenon Onegin*...

Certe, tiu verko jam estis plurfoje tradukita al Esperanto, ekzistas minimume 7 versioj (kvankam ne ĉiuj estas plenaj kaj ne ĉiuj konserviĝis ĝis nun). Kial do necesis la nova? Verdire, mi mem ne sciis respondon al tiu demando, kiam en 1999, dum 200-jara jubileo de Puŝkin, la redaktoro subite proponis al mi fari novan tradukon de Onegin. Mi hezitis dum unu jaro, sed, atente traleginte du jamajn tradukojn, eksentis la neceson eklabori. Post konatiĝo kun

pliaj tradukoj mia decidopli kaj pli firmiĝis...

Unue, tradukistoj (eĉ tiaj famaj kiel S.Rublov, kies tradukoj el Puŝkin estas ĵus eldonitaj) ofte, por faciligi sian taskon, substituis precizajn realaĵojn de la originalo per siaj liberaj fantazioj aŭ banalaj ĝeneralizaĵoj.

Due, Esperanto evoluas, kiel ĉiu reale funkcianta lingvo. Tial nun la tekstoj de 1920–30aj jaroj — do ankaŭ la traduko de N.Nekrasov (eldonita libroforme en 1931) — aspektas arkaike kaj iom nenature. Krome, mi tre atentis kaj strebis transdoni la “ŝlosilajn vortojn” kaj la aŭtoran rilaton al la eventoj; kie eblas — sekvi la rimojn de la originalo (se vi vidos adasismon aŭ tro banalan rimon, iom strangan komparon, ŝanĝon de gramatika tempo ktp. — estu certa, ke tiuloke Puŝkin uzis la samon).

Trie, dum preskaŭ 200 jaroj rimarkinde evoluis ankaŭ la rusa lingvo kaj kulturo. Pluraj vortoj ŝanĝis la sencon, iuj esprimoj iĝis neuzataj kaj pro tio nekompreneblaj por nuna rusa leganto (ankaŭ tradukisto); forgesiĝis iam popularaj verkoj, aludoj al kiuj multas en la romano. Hodiaŭ nur fakuloj povas klarigi tion, kio en la epoko de Puŝkin estis konata al ĉiu klera

homo. Certaj fremdlingvaj (ĉefe francaj) esprimoj estis tiam nature uzataj en rusa parolo (de nobeloj), nun ne plu. Aliflanke, iuj realaĵoj kaj respektivaj vortoj estis tiam novaj kaj ekzotikaj — Puŝkin uzas ilin en origina fremdlingva ortografio kaj/aŭ kursive, iam eĉ speciale komentas.

La nuna leganto perceptas la romanon ne tiel, kiel la 19-jarcenta. Tial en tradukoj ofte aperas io esence simila al “Favora regnestro, honoro havas alkuŝigi...” — rekta transdono de apartaj vortoj kun plena perdo de vera senco. Do ne miru, ke tiu ĉi traduko kelkloke draste diferencas disde la plifruaj, kaj atentu la komentojn fine de la libro.

Krome, pluraj strofoj de la originalo estis preterlasitaj aŭ “korektitaj” pro cenzuraj kaj aliaj kaŭzoj (ekzemple, por ne ofendi ankoraŭ vivantan personon). Kelkfoje Puŝkin ŝanĝis siajn planojn, do ankaŭ malnetaĵoj povas esti interesaj. Baldaŭ vi legos la plej plenan tekston, kun la strofoj (entute pli ol 40, i.a. la tuta 10a ĉapitro), kiuj en la plej bonaj rusaj eldonoj aperas nur inter komentoj aŭ suplemente, do ili neniam estis tradukitaj al Esperanto.

Fine sed ne laste, rusaj poemtradukistoj,

influataj de la gepatra lingvo, ofte uzis t.n. “abortajn” rimojn, kun drasta malsameco de postakcentaj silaboj — ne konsciante, ke por alinacianoj tio tute ne havas rimefekton. Mi nepre evitis tion.

Do espereble tiu ĉi traduko impresos la internacian leganton same, kiel la originalo impresis la rusan leganton de 1830aj jaroj.

Valentin Melnikov

1

I

*“Jen mia onklo — virt-modelo —
subite ekmalsanis tre;
li aŭdis vokon de l' ĉielo —
plej bona estis la ide'.
Ekzemplo lia vin instruos;
sed, Dio, kiel mi enuos
tagnokte sidi ĉe la lit'
de l' malsanulo, sen evit'!
Ja kiom aĉas la afekto —
komplezi al duonvivul',
kusenojn turni laŭ postul',
pocion doni kun respekto,
suspiri, pensi: ĉu en fin'
diablo iam prenos vin?”*

IV

*Sed kiam la junec' ribela
ekregis en Eŭgena kor',
kun revoj kaj kun tristo hela —
Monsieur pelita estis for.
Do jen Onegin, hom' libera,
tondita laŭ la mod' supera,
londona dandy laŭ kostum' —
aperis fine en mondom'.*

*La francan uzis li perfekte
por skribo kaj konversaci',
mazurkon dancis kun graci'
kaj riverencis senafekte;
l' mondum' decidis (kion pli?),
ke saĝas kaj tre ĉarmas li.*

V

*Ni ĉiuj, vere, lernis ion,
poiomete, iel ajn,
do per eduko, danke Dion,
facilas brili, je verŝajn'.
Laŭ juĝo de l' mondum' rigora,
Onegin estis ja bonmora
instruitulo, sed pedant':
talenton de sufiĉa grand'
li havis por preter-mencio
de ĉiuj temoj en parol';
silentis dum diskuta bol'
kun la aspekt' de granda scio,
kaj flamis por ridet' de dam'
li per subita epigram'.*

XVI

*Mallumo. Sledo lin atendas.
Vetur'. Koĉero krias: "For!"
Per frosta neĝopolv' arĝentas
kolumo lia el kastor'.*

*Li hastas ĉe Talon aperi:
atendas tie lin Kaverin.
Kork' al plafon'! Salutas lin
ekspruco de kometa vin',
roast-beef sanganta — laŭ bonvolo,
kaj trufoj — lukso de junec',
de franca art' elita spec';
Strasburga kuk' el ladskatolo,
fromaĝ Limburga — alta klas',
kaj orkolora ananas'.*

XXXV

*En paca vivo ili amis
 kutimojn de l' gepatra ter':
 alvenon de printemp' ornamis
 per rusaj blinoj kun buter';
 konfesis dum la jar' dufoje;
 rond-balancilon ŝatis ĝoje,
 popolajn kantojn, dancojn plu.
 Dum festo de la Triunu'
 oscedas la popol-amaso —
 sur levistikon kun fervor'
 larmetis ili laŭ la mor';
 por ili vivnecesis kvaso,
 kaj en festen' laŭ ranga skal'
 por gastoj estis la regal'.*

XXXVI

*Do ili maljuniĝis pare.
 Kaj malfermiĝis jam en fin'
 ĉerk' por la edzo. Ordinare
 li prenis kronon de l' destin':
 li mortis je tagmanĝa horo,
 kaj adiaŭis kun priploro
 najbar', filinoj kaj edzin'
 pli kore, ol alian, lin.*

*Li estis simpla kaj honesta,
kaj, kie kuŝas lia rest',
sur tomba ŝton' legeblas tekst':
Dimitrij Larin, vir' modesta,
ĉefkolonel', kun dia grac'
ripozas tie ĉi en pac'.*

4

XL

*Sed nia norda temp' somera,
 pri suda vintro parodi',
 brilinte, ĉesas, efemera —
 ne ŝatas tiun fakton ni.
 Ĉiel' jam spiris per aŭtuno,
 jam malpli ofte brilis suno,
 pli kurta iĝis hela tag',
 arbara denso ĉirkaŭ lag'
 nudigis triste kaj sublime,
 sur kampo jen nebula stri',
 ansera karavan' kun kri'
 al sudo flugas: do proksime
 la temp' enua laŭ esenc' —
 novembro pretas al komenc'.*

XLI

*En frid' aperas matenruĝo,
 kvietas post laboro-fin'
 la kampoj; iras nun kun muĝo
 malsata lupo kun lupin';
 ĉeval' timanta ronkas treme —
 kaj la rajdanto singardeme
 galopas for de tiu val';
 paŝtisto brutojn jam el stal'*

*ne pelas ĉe maten-aŭroro,
tagmeze lia korna son'
ne vokas gregon laŭ bezon';
virgino kantas dum laboro,
kaj vintre ĉe la nokta ŝpin'
flamanta ken' amikas ŝin.*

XLII

*Do regas frostoj jam krakante,
arĝente helas kampa vast'...
(Vi nun atendas rimon "kante" —
do jen, ricevu sen prokrast'!)
Pli bele ol eĉ mod-pargeto,
glacie brilas rivereto,
de ĝojaj knaboj la soci'
glitkuras brue sur glaci';
ansero peza gravmienas,
volante naĝi laŭ river',
glacion paŝas kun fier',
sed glite falas ĝi; serenas
unua neĝ en fluga driv'
falante al la bord-dekliv'.*

XLVII

*Flam' estingiĝas; karbo ora
cindriĝas hele post forbrul';
apenaŭ ŝvebas stri' vapora,
kaj varme spiras en angul'*

nun la kameno. Tuben fluas
la pipa fumo, kaj situas
surtable ŝaŭma vinpokal'.
Densiĝas jam vesper-vual'...
(Al mi tre plaĉas blag-abundo
kaj amikeca vin-kalik'
en temp', nomata sen logik'
"la tempo inter lup' kaj hundo" —
nom' vere stranga.) En komfort'
aŭdeblas nun amika vort':

5

I

*En tiu jar' aŭtunvetero
tro longe daŭris. La natur'
atendis vintron kun sufero.
Ekneĝis januare nur,
la trian nokte. Frumatene
Tatjana vidis: jen ĝardene
blankiĝis ĉio, hela bril'
sur bed', tegmentoj kaj baril',
sur vitroj la ornam' aĵura,
jen arboj en la prujn-argent',
longvostaj pigoj — gaja gent',
kaj la montaron kovras pura
de l' vintro luksa tapiŝeg'.
Sur ĉio — blanke-brila teg'.*

VIII

*Tatjana kun scivolo granda
rigardas al la vaks-figur':
formiĝas el bizaro fanda
pri io stranga la aŭgur';
el akvoplana plad' laŭrite
elvenas ringoj; kaj subite
ŝi sian ringon el ĉi kvant'
ricevis kun antikva kant':*

“Kampuloj riĉaj en vilaĝo
arĝenton rastas per la ŝpat’;
al vi ni kantas por bonstat’
kaj gloro!” *Tamen pri damaĝo*
ĉi kant’ avertas laŭ destin’;
pli bonas aŭdi pri katin’.

XXIV

Alarmas ŝin la sonĝo terura.
Ne konsciante pri la senc’,
signifon de l’ koŝmar’ obskura
Tatjana serĉas. Por komenc’
laŭ kurta listo, malkviete,
Tatjana trovas alfabeto:
arbar’, blizard’, kaban’, krescent’,
ogrin’, ponteto, urso, vent’,
kaj tiel plu. Ŝin kontraŭ duboj
ne helpas de Zadeko saĝo;
sed aventurojn por domaĝo
al ŝi aŭguras la inkuboj.
Dum kelkaj tagoj, pro l’ memor’,
ŝin ne forlasis mishumor’.

XXI

*L' poemon savis la hazardo;
 mi ĝin konservas en kajer':
 "Ho kial dronis en la tardo
 la ora tag' de primaver'?"
 Kaj kion portos nova tago?
 Apenaŭ helpus la imago,
 mi vane kaptas per okul'
 la svagajn bildojn tra nebul'.
 Ĉu min mortiga sago pikos,
 aŭ preterflugos, je fortun' —
 egale! Ĉio bonas nun,
 al ĉio tempon sort' indikos:
 Benatas tago en seren',
 benatas de tenebro ven'!*

XXII

*"Aŭrore sunradio helos,
 triumfos tago super ter';
 sed mi — probable, mi degelos
 en kripta ombro, en mister',
 kaj la memoron pri l' poeto
 englutos malrapida Leto.
 Forgesos tuta mondo min,
 sed vi ĉu venos, bel-virgin',*

*por larmi super toambo frua
kaj pensi: ja min amis li,
al mi dediĉis kun pasi'
aŭroron de la vivo ĝua!..
Alvenu, ho amik' de l' kor':
nin benus nupto kaj amor'!..”*

XXXIII

*Agrablas vere — epigrame
koleron vekis de l' fiul';
agrablas vidi: li malame,
klininte l' kornojn, en spegul'
rigardas sin, kaj diri hontas,
ke tie li sin mem renkontas;
agrablas, se por infami'
li stulte muĝos: estas mi!
Eĉ pli agrablas — en trankvilo
prepari ĉerkon por rival',
kaj celi al la frunta pal'
je la distanco de ĝentilo;
sed al prapatroj sendi lin
ne tre agrablos jam en fin'.*

XXXIII

*Se ni pli zorgos pri stimulo
por bona kler', kun nobla cel',
en estonteco (laŭ kalkulo
de la filozofi-tabel',
post kvin jarcentoj) vojoj, klare,
ĉe ni ŝanĝiĝos senkompare:
ŝoseoj ĉie tra Rusland'
plektiĝos en abunda kvant'.
Per larĝaj arkoj pontoj feraj
transpaŝos super la akvar';
disiĝos montojn ni; sub mar'
aperos volboj plenfieraj,
kaj ĉiu pasaĝer-staci'
disponos je restoraci'.*

XXXIV

*Nun aĉas niaj vojpavimoj,
 putradas pontoj en forges',
 en la stacioj — puloj, cimoj
 malhelpas dormon per agres';
 manĝejoj mankas. Nur stabile
 prezlisto pompas, senutile
 sur muro pendas ĝi: incit'
 kaj vana mok' por appetit'.
 Kaj dume vilaĝan'-ciklopo
 ĉe forĝa flam' kun ruĝa hel'
 kuracas flegme per martel'
 kreaĵon sveltan de Eŭropo,
 benante sulkojn ĉe vojrand'
 kaj kavojn de la patroland'.*

XXXVIII

*Kastel', adiaŭ, atestanto
 de l' eksa glor'. Ne haltu, nu!
 Jam blankas fostoj ĉe la rando
 de l' urbo. Laŭ Tverskaja plu
 kaleŝo flugas trans kavetoj.
 Preteras budoj, inoj, sledoj,
 lanternoj, buboj, apotek',
 vendistoj, buĥaran'-uzbek',*

*palacoj, temploj kaj ĝardenoj,
butikoj kun diversa var',
bulvaroj, turoj, kozakar',
kabanoj, modaj magazenoj,
balkon', leonoj ĉe pordeg',
sur krucoj — da monedoj greg'.*

XIII

*Lin ekobsedis maltrankvilo,
 neretenebla vojaĝem'
 (turmenta, vere, vivostilo,
 ne multaj ĝin elektas mem).
 Do li forlasis la bienon,
 de kampoj kaj arbar' serenon —
 kun sanga ombro en imag',
 hantinta lin je ĉiu tag',
 kaj ekvojaĝis li sencele,
 kun sola sento en obsed';
 sed ankaŭ pro vojaĝoj ted'
 subpremis baldaŭ lin kruele;
 samkiel Ĉackij, por final'
 revenis li — de ŝip' al bal'.*

XIV

*Sed jen la homamas' ekstremis
 flustreto kuris tra la hal'...
 Al la mastrino dam' alvenis
 ŝin sekvis grava general'.
 Ŝi estis tute ne rapida,
 ne parolema kaj ne frida,
 sen arogeco por impres',
 sen pretendemo je sukces',*

*sen afektetoj laŭ la rolo,
sen la imita fals-kondukt'...
Kviete simplis ŝi en tut',
aspektis ŝi kiel simbolo
du comme il faut...*

(Ho ve, Ŝiŝkov': por la traduko mankas pov').

XVIII

*“Do vi edziĝis! Ag' ne vana!
Delonge?” — Pasis dua jar'. —
“Al kiu?” — Larina. — “Tatjana!” —
— Ĉu vi ŝin konas? — “Jes, najbar'
mi estas.” — Venu. — Princo iras
al la edzino, kaj altiras
amikon sian por prezent'.
Ŝi lin rigardas... Stranga sent'...
Sed pro konsterno enanima,
konfuz', perplekso kaj mireg'
ŝin ne perfidis la memreg',
kaj restis la sinten' kutima:
la sama tono kaj ĝentil',
kaj klinsaluto en trankvil'.*

XIX

*Jes ja! neniom ŝi ektremis,
ŝin ne atakis ruĝ aŭ pal'...
Ne movis brovon, ne kunpremis
eĉ lipojn je eventual'.*

*Eŭgen' rigardis diligente,
sed li ne povis eĉ momente
rekoni trajtojn de l' fraŭlin'.
Li volis alparoli ŝin,
sed — ne kapablis. Ŝi enketis,
ĉu jam delongas la alven',
de kiu lok' — ĉu de l' bien'?
Kaj poste al la edzo ĵetis
rigardon lacan; glitis for...
Kaj li senmovis en angor'.*

10

I

*Reganto febla kaj kovarda,
nenifarulo, kalva dand',
de gloro favorat' hazarda
potencis tiam en la land'...*

XII

*Rusi' denove ekkvietis,
la car' diboçis plu, sed jam
delonge, eble, reflagretis
fajrero de alia flam'...*

LETERO DE TATJANA AL ONEGIN

*Al vi mi skribas — kio plia
necesus por la sent-esprim'?*
*Nun povas vi laŭ volo via
ignori min kun malestim',
sed al plorinda sorto mia
havante guton da kompat',
vi min ne lasos en malŝat'.
Komence volis mi silenti,
kaj kredu, ke pri mia hont'
ne scius vi eĉ en estont',
se povus mi esperon senti
ke mi vin vidos — iam ajn,
eĉ unufoje dum semajn',
por aŭdi vian voĉon, diri
replike vorton, kaj dum tag'
kaj nokto, ĉiam en imag'
renkonton novan prisopiri.
Sed vi enuas en soci',
vilaĝo tedas vin kutime,
kaj ni... ne brilas tute ni,
eĉ se vin ŝatas simplanime.*

*Ho, kial vi vizitis nin?
Izole, en vilaĝa foro*

*neniam mi ekkonus vin,
kaj vivus sen amar', angoro.
Impetojn de malsperta koro
bridinte iam (eble, jes...),
amikon trovus laŭ inklino,
fidela iĝus mi edzino
kaj la patrino, laŭ neces'.*

*Alia!.. Sed sur tuta tero
neniu hom' egalus vin!
Decidis la Supera sfero:
mi estos via, laŭ destin'.
Viv' mia estis garantio
de nia nepra rendevu';
al mi vin certe sendis Dio,
ĝis morto vi min gardos plu...
En songoj vi al mi imponis,
min ĉarmis — antaŭ via ven':
rigardo logis min ĝis sven',
la voĉo enanime sonis
delonge... Estis ne vizi'!
Eniris vi — mi tuj rekonis,
ekflamis kaj en sentoj dronis,
enpense diris mi: jen li!
Ĉu ne, mi aŭdis vin kaj ŝatis:
al mi vi diris en intim',
dum mizerulojn mi kompatis,
aŭ per sincera preĝo flatis*

angoron preman de l' anim'?'
Kaj ĉu ne vi en tiu horo
ekbrilis, kvazaŭ meteoro,
kaj en krepusko de vesper'
kliniĝis super la kuseno?
Al mi, kun amo kaj sereno
vi flustris vortojn de esper'...
Ĉu estas vi anĝelo garda,
aŭ deloganto plej kovarda:
vi miajn dubojn pelu for.
Ĉu tio estas — iluzia
trompaĵo de naiva kor',
kaj min atendas sort' alia?..
Egale! Mian sorton nur
al vi transdonas mi sen plendo,
mi verŝas larmojn sen mezur'
kaj vin petegas pri defendo...
Imagu: vivas mi en sol',
neniu min komprenas tute,
racio mia velkas mute
kaj mi pereas sen konsol'.
Do venu: per rigard' aŭ voĉo
esperon veku en la kor',
aŭ rompu sonĝon kun angor'
per la merita, ve, riproĉo!

Relegi timas mi... Jen fin'!
La honto premas min katene...

*Honoro via gardas min,
mi min al ghi konfidas plene...*

LETERO DE ONEGIN AL TATJANA

*Prognozas mi: ofendos vin,
se la sekret' malĝoja klaros.
Malŝato kia ekamaros
en la rigardo de l' princin'!
Mi kion volas? Mian koron
malfermas mi por kia cel'?
Malicon kian kaj rankoron
provokos, eble, ĉi rivel'!*

*Vin laŭ hazardo renkontinte,
ekbrilon de tener' vidinte,
mi ne aŭdakis je la fid':
neglektis karan mi kutimon;
kaj al libero teda limon
ne volis meti per decid'.
Disigis nin okazo plia...
Povrulo Lenskij, la viktim'...
De ĉio kara, simpatia
mi deŝiriĝis per anim';
al ĉiuj fremda kaj vagemas...
Liber', trankvilo — kredis mi —
feliĉon anstataŭos. Di'!
Eraro, puno kiom premas...*

*Ne, vidi vin en ĉiu hor',
post vi konstante ĉie iri,
rideton kapti kun ador'
kaj movon de rigard' admiru,
vin aŭdi longe, kun kompren'
pri via plej perfekta stato,
ĉe vi stupori pro ĉagren',
paliĝi, velki... jen beato!*

*Kaj mi malhavas tion ĉi:
sen ŝanc' vin sekvas akompane;
valoras ĉiu hor', sed mi
en splen' disipas tagojn vane,
donitajn laŭ kalkul' de sort'.
Kaj ili pezas super fort'.
Jam mia viv' perditas plene,
sed por rezisti al destin',
mi devas scii dematene,
ke tage mi ekvidos vin...*

*Ve: en humila peto mia
vi eble vidos kun sever'
insidon de ruzeco fia —
mi aŭdas vortojn de koler'.
Se sciis vi pri la turmento
sopiri pro soif' de am' —
kaj ĉiuhore per prudento
rezisti al la sanga flam';*

deziri arde ĉirkaŭpreni
genuojn viajn, kaj kun plor'
konfesojn, petojn, kulpojn peni
esprimi el la tuta kor',
kaj dume per afekta frido
sin armi por konduta stil',
paroli dece, en trankvil',
rigardi vin kun gaja vido!..

Sed estu tiel: mankas fort'
al propra mem' rezisti spite;
laŭ via volo, decidite,
mi donas min al mia sort'.